7-a JARO, N-o 360 S.A.T. LEIPZIG, 27. / 8. 1931

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

| APERAS SEMAJNE | REDAKTEJO: 14, av. de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lehner, Kolmstr. 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS SEMAJNE |
|---|---|---|

# La rezultoj k la signifo de la XI-a Kongreso.

### Al la tuta SAT-anaro!

En la antaŭa n-o de „S-ulo“ la legantoj povis legi la tekston de la rezolucio, kiu estis preskaŭ unuanime akceptata en la lasta laborkunsido de l' Kongreso (79 voĉoj por, 1 kontraŭ k 7 sindetenoj). La publikigota protokolaro donos ĉiujn klarigojn pri la debatoj k tiel la interesiĝantoj povos prezenti al si la fizionomion de la Kongreso. Sed ni volas jam nun fari kelkajn rimarkigojn, kiuj sufiĉos por ĝuste kompreni la signifon de la akceptita rezolucio.

La pasivaj membroj k la gastoj konsistigis la grandan plimulton el la kongresantoj k nur la aktivaj membroj voĉdonis. La plej granda nombro da partoprenintoj en la voĉdono estas 138 ĉe elekto de protokolantoj en la unua laborkunsido. Estis prezentataj du listoj: unu de la kongres-estraro k alia de la opozicio. Ĉe la supro de la unua listo staris la nomo de K-do Bartelmes (la „ĉeffalsisto“ de la protokolo pri la Lajpciga Kongreso!) kun 95 voĉoj; ĉe la supro de la opozicia listo kuŝis la nomo de K-dino Keable kun 43 voĉoj. Oni jam tuj povis kvazaŭ pesi la fortojn. Farante komparon kun la voĉdono okazinta en Londono lastan jaron, oni konstatas, ke la fortoj de la opozicio eĉ malkreskis proporcie dum la jaro, malgraŭ la grandskala agitado farita per „Internaciisto“, „Arbeiter-Esperantist“ k „Bulteno de SEU“. Ĉe la X-a Kongreso ja voĉdonis por la Plenum-Komitato 119 K-doj k kontraŭ 59.

Sed eble la legantoj pensos, ke la voĉdonado pri elekto de protokolantoj ne estas tre signifa. Ni do konigu la rezulton de du aliaj voĉdonoj. Por elekto de proponkomisiono la opozicio ankaŭ kontraŭmetis sian liston; ĉi tiu lasta ricevis 24 voĉojn kontraŭ 104 al la listo proponita de la kongres-estraro. Sed la plej signifa voĉdono estas sendube tiu, kiu rilatis al tio: ĉu la ĉeestantaj eksigitoj estu rajtigataj partopreni la debatojn aŭ ĉu ili estu konsiderataj kiel gastoj k ricevu la parolrajton nur ĉe la lasta kunsido por pledi por si mem kiel ili havas la rajton laŭstatute tion fari. 96 voĉoj aprobis la vidpunkton de la kongres-estraro k nur 38 la pretendon de la opozicio, kiu konsistis en tio, ke la eksigitoj havu la samajn rajtojn kiel la lojalaj membroj.

Tuj ĉe la malfermo de l'unua laborkunsido evidentiĝis, ke la opozicio estas en granda malplimulto. Tiu malplimulto eĉ pli malfortiĝis dum la daŭro de l'debatoj pro ĝia skandala sinteno. La eksigitoj Bata, Muravkin, Salan, Vildebrand, kiuj konsistigis la stabon de la opozicio, estis allasataj en la kongresĉambro kiel gastoj; ili do ne havis la rajton partopreni k iel ajn ĝeni la debatojn. Tamen dum 4 kunsidoj, en intima interligiĝo kun la neeksigitaj opozicianoj, kiuj povis sen ia ĝeno defendi sian vidpunkton, ili senĉese interrompis, bruis, insultis k kondutis laŭ maniero inda je faŝistoj. Tia konduto havis kiel rezulton, ke ĉe la lastaj kunsidoj pluraj K-doj, kiuj pro diversaj kaŭzoj simpatiis al la opozicio, akiris la konvinkon, ke ĝi malpravas k ekiris eraran vojon. Tio klarigas, kial la raportaro de l'P.K. estis akceptata per pli granda nombro da voĉoj (105), ol da tiuj ricevis la proponoj de l'kongres-estraro ĉe la unua kunsido. Notinde estas, ke la opoziciuloj forlasis la kongresĉambron, manifestacie kantante la Internacion, ĉe la momento, kiam K-do Lanti ricevis la finparolon antaŭ la voĉdono. Ili sendube ne volis aŭdi rebatojn al siaj krudaj k senbazaj atakoj. La momento estis emocia, k ĉiu ĉeestinto certe memoros kun kontento, ke la disiĝo okazis sen ia batalo aŭ interpuŝiĝo. Anstataŭ fikrii k insulti al la skismigantoj, la restantaj K-doj ekstaris k ankaŭ kantis la Internacion. Pli forte sonis la himno de la klaskonsciaj laboristoj en la kongressalono ol en la koridoro, kie malvenke paŝis erarigitaj, forirantaj K-doj...

La kongres-estraro montris toleremon, kiu ne havis la aprobon de ĉiuj K-doj. Multaj ja deziris, ke oni simple elĵetu el la kongresejo la malbonkondutajn „gastojn“. Tia farmaniero estus certe korekta k tute normala. Ni preferis tamen pacience atendi, ke la kriemuloj tiru la logikan konsekvencon de sia malvenko k foriru mem. Ni sciis, ke la opozicia stabeto deziris, ke ni uzu la perforton por elpeli ilin. Iu „eminenta“ reprezentanto de tiu stabeto, iu d-ro, uzis eĉ provokajn rimedojn por okazigi skandalon. Sed la lojalaj SAT-anoj estis avertitaj k malestime ignoris la malindajn procedojn.

La verdikto eldirita de la XI-a Kongreso estas do tute klara: granda plimulto aprobis nian agadon k komisiis nin daŭrigi la gvidadon laŭ la ĝisnuna senpartieca vojo. Tio tamen ne ŝanĝas nian decidon submeti al la tuta SAT-anaro la demandon pri fido aŭ malfido. Kun ĉi tiu n-o la aktivaj membroj ricevas balotilon, per kiu ili plilarĝigu aŭ nuligu la verdikton de la Kongreso. Ĉiu K-do havas do la eblon decidi pri la sorto de la Asocio. Ne ekzistas pli demokrata maniero ol ĉi tiu ĝenerala voĉdonado. Ni deziras ekkoni kiel eble plej baldaŭ la opinion de la tuta SAT-anaro por povi ĉu rekomenci pozitivan

# POPOLA DECIDO EN PRUSIO

La 9-a de aŭgusto por Prusio estis tago de grava decidiĝo — elektotago: ĉu restu la nuna prusa parlamento, ĉu estu novelektoj. La dekstraj (naciemaj) partioj kune kun la komunistoj estis alvokantaj al „Popola Decido“ pri tiu demando.

Por pli bona kompreno sekvu kelkaj vortoj pri la prusa konstitucio. Ĝenerale leĝoj estas farataj de parlamento. Sed povas okazi, ke pro iaj cirkonstancoj la parlamento ne plu spegulas la volon de la popolo. Por tia okazo la konstitucio havas rimedon: Se iu aro da popolanoj opinias, ke la parlamento estu foriginda, ĝi povas kolekti voĉojn, kiuj postulas la forigon. Same estus ebla la kolekto de voĉoj por iniciato de iu leĝo malakceptata de la parlamento. Tia kolekto da voĉoj estas nomata „Popola Postulo“. Ĝin devas subskribi 20 % da voĉdonrajtigitoj. Interesa estas ankaŭ la financa afero: Se la proponantoj atingas la necesajn 20 %, tiam la ŝtato pagas la kostojn; se ili ne atingas, tiam ili mem devas pagi. Se la necesa nombro estas atingita, tiam la postulo estas submetata al la parlamento kiel leĝpropono. Se la parlamento malakceptas ĝin, tiam devas okazi „Popola Decido“. Tiu okazas simile al parlamentaj elektoj. Sed la voĉdonantoj nur povas elekti inter jes aŭ ne. Se en Popola Decido la proponantoj atingas 50 % da jesaj voĉoj, tiam la propono fariĝas leĝo.

En Prusio ni havas „koalician registaron“, al kiu apartenas tri socialdemokratoj, tri anoj de „Zentrum“ (katolika partio), du anoj de Ŝtata Partio (demokrata). La registaro estis stabila. Ĝi atingis la trapenetron de la oficistaro per respublikanoj. La oficistaro, antaŭe naciema, multloke devis cedi al respublikanoj — grandparte socialdemokratoj. Tiel la registaro atingis grandan influon; la grandparte socialdemokrata sinteno de oficistoj en laborperejoj, laboroficejoj (subtenejoj), bonfarejoj, en ĉiuj oficejoj de ŝtato k komunumoj bone efikis al la popolo, speciale al senlaboruloj. La polico iĝis respublika, ne malmultaj oficiroj k altaj oficistoj estas socialdemokratoj. Tial la polico nun estas forta bastiono kontraŭ atakojn de dekstre aŭ de maldekstre.

La naciemaj partioj tre malŝatas tiun firman registaron prusian, ili volas forigi ĝin k anstataŭigi per registaro faŝista aŭ almenaŭ faŝistema. Tial en antaŭa jaro „Ŝtalkasko“, unuiĝo naciema, postulis „Popolan Postulon“ pri „la prusia parlamento estu likvidata“. Tiun postulon partoprenis krom Ŝtalkasko la nacisocialistoj, germannacia partio k la tuta aro da naciemaj unuiĝoj. Ili atingis preskaŭ ses milionojn da voĉoj, do la postulo venis antaŭ la parlamenton k — estis malakceptata. Sekve nun estis aranĝata la „Popola Decido“.

Oni propagandis por la forigo de la „marksista registaro“, insultis la ministrojn. Tamen la Popola Decido ne havis ŝancojn al venko. La Popola Postulo estis montrinta sian forton tutan. Tre multe pli da voĉoj ne estis atingeblaj. Ankaŭ la komunista partio estis forta kontraŭulo de tiu Ŝtalkaska afero, kiun ĝi nomis fiaĵo, trompo, kiun ĝi igis ridinda. Tre kompreneble, ĉar ĉiutage sur la stratoj okazis bataloj inter komunistoj k faŝistoj, ĉe kiuj ne mankis vunditoj k mortigitoj. Tiom pli la tuta lando estis konsternita, kiam lastmomente — en julio — la komunista partio deklaris, ke la Popola Decido estas r u ĝ a, ke ĝin partoprenos la komunistoj. Eĉ komunistoj mem grandparte estis konsternitaj! Ja la socialdemokrataj prusiaj ministroj — speciale *Severing* — estas treege malamataj de la komunistoj. Ja tio estis komprenebla. Tamen la aserto, ke ne estas diferenco inter registaroj respublika k faŝista estas tiom malsaĝa, ke nur somera varmego povus esti senkulpigo. Kaj eĉ ĝi ne povas validi, ĉar julio en Prusio estis malvarmeta! ! Do nun oni povis sperti, ke estis formata unu fronto de la du ekstremaj flankoj, de faŝistoj k komunistoj. Ili daŭrigis ĉiutagajn batalojn, tamen en siaj gazetoj ili montris unuecan fronton: For la prusia parlamento, la registaro! Vivu la nigra-blanka-ruĝa, vivu la ruĝa Popola Decido!! Kompreneble la naciemuloj ĝojegis pri la neatendita helpo. Ili ne estis esperintaj sukceson, sed per la nova taktiko de la komunista partio ili sentis, ke la venko ne plu estas neebla.

La nombro da voĉdonrajtigitoj estas ĉ 26 milionoj, do la necesa nombro da jesaj voĉoj estis ĉ 13 milionoj. Dum la elektoj al la regna parlamento en septembro 1930 la partioj subtenantaj la Popolan Decidon (dekstraj partioj k komunistoj) havis kune 12 279 399 voĉojn. Do por venko mankis malpli ol unu miliono, — nombro, kiu al la partioj ne ŝajnis neatingebla, ĉar oni kalkulis, ke la socialdemokrata partio estas malfortigata.

La komunista partio per ĉiaj rimedoj propagandis la partoprenon al Popola Decido. Sed la laboristaro ne montris emon, sekvi al ĝi. Kaj ne estas mirinde, ke la komunistoj mem ne bone kapablis defendi la novan sintenon de sia partio, ĉar ĝi estas tiom absurda, ke ne estis eble, ĝin elkore propagandi. Ĉar, se vere venkus la proponantaj partioj, tiam la sukceso neniam povus esti „Ruĝa Prusio“, sed nur „faŝista Prusio“ aŭ registaro simila al la nuna registaro Brüning. La komunistoj nur povus atingi pli da subpremo! — pli da mizero por la laborista klaso. Eble tion ili celis por atingi — revolucion? Tamen mankas ĉiaj kondiĉoj por sukceso. Kaj altiĝus ŝancoj por faŝistoj, kiuj per siaj agoj registaraj en Turingio k Brunsvigo donis ekzemplojn, kiel fartas laboristaro sub ilia regado.

Venis la 9-a de aŭgusto. La popolo decidis! Ĝi decidis, ke restu la nuna parlamento, la nuna registaro! Da jesaj voĉoj estis atingataj 9 793 603. Por la venko mankis 3,5 milionoj. Ĉar oni plenrajte povas supozi, ke la dekstraj partioj atingis proksimume la voĉnombron de la Regnaj Elektoj de septembro 1930 (9 280 000) — por ili la jeso al la Ŝtalkaska propono estas komprenebla — oni venas al la konkludo, ke la elektantaro komunista (kiu ĉe la lastaj elektoj elektis komunistojn) ne sekvis la gvidvortojn de la komunista partio. Preskaŭ tri milionoj sin detenis (de dekstre k maldekstre).

Por bona prijuĝo de la tuta popoldecida spektaklo estu dirate, ke dum printempo de proksima jaro la parlamento laŭleĝe estos nove elektata, ke per venko nuna oni estus atinginta, ke la novelektoj estus okazintaj eble kvar aŭ kvin monatojn pli frue.

*Adolf Sproeck, Berlin.*

## *POR NIA MEDITO.*

*Mi ne amas la novon pro novamo, k mi ne amas la malnovon pro tio, ke ĝi estas malnova. Mi opinias, ke ne estas malfacile nek interese voli artefari estontaĵon per simpla renverso de tio, kio ekzistas, aŭ voli, ke tio, kio ekzistis, postvivu la kaŭzojn de ĝia ekzisto. Kio estas malfacila, tio estas ligi la memoron kun la fakto. la fakton kun la tendenco, kompreni la neeviteblon k doni al ĝi per antaŭvido, per la inteligento la ŝajnon de dezirinda modifo saĝe efektivigita.*

*Paŭlo Valeri (france: Valéry).*

*

*En Germanio nuntempe estas elspezataj ĉiujare ĉirkaŭe ok miliardoj da markoj por alkoholo k tabako. Per la mono, elspezita okaze de la Oktobra festo en Munĥeno (Germanio) dum 1925 nur por biero, oni povus konstrui ĝardenan urbon por 2000 loĝantoj.*

*El Talizia 7/31 (14624).*

Kiel mi havigos al mi
belajn ilustritajn plurkolorajn
**POŜTKARTOJN**
kiuj simboligas la idealon
**DE SAT** ?
**Serion** de 5 tiaj artaj liveras
kontraŭ pago de 0,50 mk. g.
**Administracio de SAT**
**Leipzig O. 27, Colmstr.**

laboron, aŭ transdoni la gvidadon en aliajn manojn. Kamaradoj! Urĝas ĉesigi la necertan situacion, en kiu troviĝas nun la Asocio; ties estraro bezonas nepre havi sufiĉan aŭtoritaton por fari kiel eble plej baldaŭ la necesajn elpaŝojn, kiuj savos nian entreprenon el tre embarasa situacio — situacio kaŭzata pro artifika reteno en Moskvo de granda sumo ŝuldata al SAT. Nenial prokrastu plenumi vian laŭstatutan devon; resendu kiel eble plej baldaŭ vian balotilon al la Administracio, Kolmstrato 1, *Leipzig O 27*.

Kiel limtempon por la Eŭropaj landoj ni difinas la 30-an de septembro; por la ekstereŭropaj landoj la 15-an de novembro.

LA PLENUM-KOMITATO DE SAT.

# LETERO EL LITOVUJO

En la laborista esperanta gazetaro pri Litovujo nun oni nenion aŭdas. Oni supozus, kvazaŭ tia lando ne ekzistas en la mondo. Iu K-do demandis min: „Ĉu vi havas propran nacian lingvon, aŭ ĉu vi parolas polan aŭ rusan lingvon?“ Ĉu ne strange?

Vere, Litovujo estas malgranda balta lando. Lando inter verdaj arberoj, kun siaj moroj, doloroj, kun sia pasinto, kruela nuntempo k malgranda estonto.

Longan tempon regis en Litovujo la rusoj. Ili persekutis ĉion, kio estas litova: morojn, kulturan k politikan movadon, ankaŭ lingvon k gazetaron. Antaŭ la jaro 1905 skribi, legi k eĉ paroli litove oni ne rajtis. La litovoj ĉiam pli k pli akre kontraŭbatalis la carismon. La revolucia movado kontraŭ carismo en 1905 estis forta en tiu lando. La tutan movadon gvidis Socialdemokrata Partio de Litovujo. El gvidantoj de socialista k kultura movado mi mencias d-on Kudirka, socialisto, aŭtoro de litova himno, redaktoro de l'unua litova gazeto „Varpas“, k J. Baranavičius, J. Ŝliupas — redaktoroj de demokrata gazeto „Aŭroro“. Sed ili estis nur spiritaj gvidantoj. En la batalo havis la popolo siajn proprajn gvidantojn, kiuj nun jam estas forgesitaj.

En 1918 Litovujo fariĝis sendependa, demokrata respubliko. La parlamento likvidis la grandajn bienojn. Soldatoj k malgrandaj vilaĝanoj ricevis terparton da 2—5 hektaroj. La ekonomia k kultura stato de l'lando progresis.

En jaro 1926 la socialista registaro de d-o K. Griniaus volis enkonduki ekonomiajn reformojn, peli el lernejoj la klerikalismon, likvidi la militan staton en la lando, — sed la klerikaluloj kune kun la grandbien-posedantoj faris ribelon k renversis la registaron.

**Faŝisma regado.**

Kruelaj tagoj komenciĝis en Litovujo. Faŝista teroro premegis la landon. Oni sufokis la laboristan k demokratan movadon. Ĉiuj profesiaj, kulturaj k ekonomiaj organizformaĵoj, kiujn gvidis socialistoj, iĝis kontraŭleĝaj. Centoj da junulgrupoj estis fermataj. Precipe estis persekutataj la gejunul-organizoj „Aŭroro“ k „Foiroj“. Grandaj bienposedantoj reakiris la bienojn. Jezuitoj k klerikaluloj plenokupis la lernejojn. Socialistaj instruistoj tuj estis maldungataj, lernantoj forpelataj el la lernejoj, ĉiuj lernejorganizoj fermataj. La lernejoj nur estas fabrikaĉoj de ŝovinismo k militismo. Ankaŭ en manojn de 6—9-jaraj infanoj oni ŝovas armilojn.

La ekonomia vivo estas tute rigidiĝinta. Laborkondiĉoj — la plej malbonaj. Laboristo laboras en fabriko 10-14 horojn tage, k por tio ricevas 150-100 lit-ojn monate (10 lit-oj = 1 dolaro). Kamplaboristoj ricevas nur 20-30 lit-ojn monate. Granda mizero. Batali k striki oni ne povas. Sed strikoj okazas dank' al tiel ekstreme malbona situacio. Nun strikas laboristoj ĉe fervojkonstruo Telŝiai—Kretinga; sed, ni jam ekscias, ke mastroj per polico dispelis la strikant-vicojn: multajn oni arestis k enkarcerigis.

La litova laboristaro, la gejunularo, ne povis silenti. En 1927 okazis kontraŭfaŝista ribelo en Taŭrogen, kiun gvidis socialdemokratoj. Ĝi malsukcesis. Multajn K-dojn oni vundis, 10 estis mortpafitaj, k pli ol 300 personoj migris eksterlanden. Tiam la elmigrantoj informis per *esperanta* gazetservo la tutan mondon pri kruelaj fiagoj k krimoj de l'faŝismo, k pri heroaj bataloj, en kiuj mortis K-doj Mikulskis, Vosilius, Ruzgas, Savenas, Merkelin, Rugaitis, Pozela k.a. — pli ol cento da laboristoj, inter ili multaj gejunuloj.

**Senrajtigoj.**

Antaŭ kelkaj semajnoj okazis elektoj por la parlamentetoj de l'apartaj landregionoj. Elekti ne ĉiuj povis: ne rajtis la laboristaro k malriĉaj kamparanoj (ĉar ili ne havis ajnan posedaĵon), ne rajtis junularo, ne virinoj nek soldatoj. Ĉiuj partioj en Litovujo bojkotis tiajn elektojn. Sed la polico ordonis elekti — krome bojkotantojn oni taksas kiel perfidulojn je patrujo, eĉ eble persekutos ilin.

La litova burĝaro klopodis malhelpi la elektadon de poloj k judoj, sed vane. La elektoj okazis, k en duono da Litovujo la urbestroj estos judoj aŭ poloj, ĉar la juda k pola burĝaro aktive partoprenis en la elektoj.

Do, la veron diris la granda litova popola poetino Zemaite: „Mi revenis en Litovujon k ne trovis Litovujon . . .“ En tiu lando litovo nun estas nigra sklavo: nur juda, pola, rusa, litova burĝaro tre bone kunvivas k per ĉiuj rimedoj (precipe per sindikatoj, kiuj laboras en ĉiuj ekonomiaj branĉoj) ekspluatas la popolon.

Sed post grandaj persekutoj, premegoj, Litovujo de Laboro firmiĝas. La laboristaro organizas sin, la kamparanoj progresas, radikaliĝas. Ekzemplo: en iu laborejo en la ĉefurbo Kaŭnas perdis sian vivon juna laboristo, K-do Otaŝaitis, kiu estis antaŭe junoficiro, sed pro batalo kontraŭ la diktatoreco estis malliberigita k kondamnita. Pli ol milo da laboristoj, junaj k maljunaj, sekvis la kadavron de l' K-do. Ĉiuj kun ruĝaj signaloj, ardaj paroloj, fieraj. Ektimis la burĝaro. Novaj fortoj. Nevenkeblaj fortoj de socialista kunbatalo.

**Revolucia literaturo.**

Maldekstran litovan literaturon prezentas la ĵurnalo „Tria Fronto“. Tiu ĉi ĵurnalo estas la plej moderna laŭ stilo k enhavo, tre legata tra la tuta lando. En vicoj de „Tria Fronto“ laboras la plej kapablaj fortoj de junaj verkistoj, K-doj Kazis Boruta, politika elmigrinto, tre talenta verkisto k poeto, aŭtoro de l'poemaro „Litovujo sur krucoj“ — libro, kiu estas ornamo de l' litova literaturo k akra ilo kontraŭ la reakcio. K-doj Cvirka, Venclova, Jakuhenas, Raila, Montvilas, Korsakas k.a., kiuj ĉiuj estis persekutataj. K-doj Jakuhenas k Montvilas nun estas en malliberejoj.

La „Tria Fronto“ kun sia enhavo tre revoluciema k radikala, tre malplaĉas al la burĝaro k klerikaluloj. Ili minacas la redakcion per polico k eĉ revolveroj. Sed ho ve! Juna talenta poetino Salomeja Neris, kiu ĝis nun laboris nur ĉe klerikala gazetaro, nun kun abomeno forlasis tiun flankon k eniris en „Tria Fronto“.

„Tria Fronto“ eldonis i. a. jenajn librojn: „Fabeloj el cemento“ (Ŝimkus), tre impresa poemaro pri nova Litovujo, novaj liberaj tempoj; „Sunsubiro en vilaĝo Nika“ (P. Cvirka), rakontoj el la nuntempa vivo de l'vilaĝanoj; „Barbaroj krias“ (Raila) — protesto, ribelo kontraŭ reakcio, kantoj de nova laboristaro; „Betuloj en ventego“ (K. Boruta) k.a. — Unuvorte, „Tria Fronto“ estas tre taŭga ilo en batalo por nova Litovujo.

Ankaŭ en tiu ĉi lando oni observas la revolucian movadon, kiel en la tuta mondo. Malgranda mia patrujo batalas kontraŭ nuna reakcio, suferas por novaj, pli belaj tempoj. K-doj! Kun ruĝaj aŭroroj ĉe vi, ĉe ni, vin salutas samideano el malproksima Litovujo.

*K. Vincas (Kaŭnas).*

**Pri la enhavo de artikoloj aperantaj en „S-ulo“ respondecas la aŭtoroj.**

# LA FONTO DE SENLABORECO (Daŭrigo; vidu n-ojn 357/58, 359.)

6.

**Ĉinio** ja ne estas kolonio, sed ankaŭ lando, kiu estas ekspluatata de imperiistaj ŝtatoj. Jam 11 jarojn Ĉinio batalas por sendependeco de imperiistaj ŝtatoj k por pli bona socia ordo. La imperiistaj ŝtatoj venkis pro sia mono; la nacia ĉina registaro perfidis siajn celojn; nun ĝi servas al la interesoj de l'ĉina burĝaro k de l'imperiistaj ŝtatoj, subpremas kruele k senkompate ĉiujn kontraŭulojn, ĉiun laboristan aŭ kampulan organizon.

Tamen la socia batalo furiozas seninterrompe. Ĉar la viv-kondiĉoj de l' ĉinaj laboristoj k terkulturistoj estas teruregaj. Certe niaj rusaj k germanaj K-doj vidis la filmon „La Dokumento de Ŝanĥajo"; eble ankaŭ niaj okcidenteŭropaj K-doj. Kaj la raportoj de eŭropanoj k ĉinoj certigas la faktojn montritajn en tiu filmo.

La situacio de l'industria laboristaro estas en Ĉinio la sama kiel en Hindio. La salajroj estas tre malaltaj; la labortempo estas 12—15 horojn tage. Virinoj k infanoj, jam en aĝo de ses jaroj, laboras tre multe en la fabrikoj; ĉar la viroj ne gajnas sufiĉe, por ke ili povu nutri familion. La laboro okazas ofte en malsanaj fabrikoj k sub teruraj kondiĉoj.

Ĉi tiuj teruraj viv-kondiĉoj estas eblaj nur sekve de grandega rezervarmeo. Mi menciis jam komence, ke ĉina K-do, *Kuo Ŝien-jen,* taksas la nombron de l'senlaboruloj en Ĉinio je 15 milionoj. Li aldiras, sub normalaj kondiĉoj, t.e. se ne okazas malbona rikolto, superakvego aŭ iu simila malbonaĵo.

Ĉar ankaŭ la viv-kondiĉoj sur la kamparo estas teruraj. Ni vidas similan bildon kiel en Hindio. La plimulto de l'kamparanaro estas sen tero, — 75 elcentoj de l'terkulturistoj posedas nur 6 elcentojn de l'kulturita tero; male, la klaso de l'ter-posedantoj, nur 13 elcentoj de l'kamparanaro, posedas 81 elcentojn de l'tero. 40 elcentoj de l' terkulturistoj estas farmistoj.

Se kampulo volas farmi, li devas doni al la posedanto de l'tero garantiaĵon, kiun li perdas, se li ne povas pagi la farm-monon. Ĉi tiu farm-mono sumiĝas mezkvante je 50 pocentoj de l'rikoltaĵo. Do, kiel skribis la ĉina saĝulo *Mong-dsi* jam antaŭ 2500 jaroj: „. . . unuflanke, la homoj ne havas sufiĉe por servi siajn gepatrojn, k aliflanke ne sufiĉe por nutri edzinon k infanojn. Eĉ en fruktedona jaro ĉiu estas en mizero; sed kiam venas malbona jaro, tiam la homoj ne estas ŝirmataj kontraŭ malsatmorto." Pri pli posta tempo la „ĉina historio" raportas: „La farmistoj devas pagi al posedanto de tero kvin dekonojn de l'rikoltaĵo kiel renton. La kompatindaj homoj vivas tre mizerege, vestas sin malbone k estas kiel bestoj." Kaj tiu priskribo taŭgas ankaŭ por la nunaj cirkonstancoj. Se la farmisto ne povas pagi la farm-monon, li perdas sian garantiaĵan monon k nun li devas labori kiel kamplaboristo aŭ migri en la urbojn kiel taglaboristo; se li ne trovas laboron, li devas almozpeti aŭ vendi sin kiel soldaton; aliel li estiĝas „rabisto". „La riĉuloj posedas multan teron . . . . Sed la malriĉuloj posedas eĉ ne plenmanon da tero k devas vendi sin kiel servutulojn pro malsato."

Ni vidas la devenon k la kaŭzon de tiu ĉi rezerv-armeo. Malgranda klaso da homoj posedas la teron k povas devigi la aliajn, labori por ĝia profito.

Jam dum la tempo de l'granda saĝulo *Kung Fu-tse*, antaŭ 2500 jaroj, furiozis en Ĉinio sociaj bataloj. Jam el tiu tempo, la plej malnova ĉina libro Ŝi-kieng raportas: „Tiu posedas domon k tiu grenon. Sed la popolo posedas nenion k estas kruele trafita de la okazaĵoj de l'naturo." Por ne malsatmorti, la kampuloj estiĝis „rabistoj", bataloj ekestis, ĝis finfine la kampuloj havigis al si la teron. Sed iom post iom kreskis nova klaso da posedantoj de tero; la kampulaj viv-kondiĉoj malpliboniĝis pli k pli, ĝis ree ekestis ribeloj. Ĉiam ree dum la ĉina historio okazis tiaj ribeloj, proksimume en ĉiuj 200 jaroj.

Ankaŭ nun furiozas bataloj. Ilia centro estas Suda Ĉinio, la ĉefa distrikto de farmistoj k malriĉaj kampuloj. Kune kun ili batalas la industria laboristaro k la bataloj ne finiĝos antaŭ ol venkis la popolo. Ĉar ili batalas kun persistemo k kuraĝo por siaj rajtoj, ne klinite de kristana servutemo.


LITERATURO:

germanlingva:

*Kuo Ŝien-jen k Karl Hinkel:* „4600 jaroj de Ĉinio." Getingen 1930. Eldonejo „Publika Vivo".

*Kuo Ŝien-jen:* „Kapitalismo k propraĵo de tero en Ĉinio." Disertaĵo. 1930.

„Laborista movado k revolucio en Ĉinio." 1925.

*T'Ang Leang-li:* „Ĉinio ribelas." Lajpcig 1927.

*Mong-dsi:* Tradukita de *Riĥard Vilhelm.* Jena 1923.

anglalingva:

„Ĉinia Jarlibro". Londono 1928.

„The Eastern Miscellany", diversaj kajeroj. 1927, 1928. Ŝanĥajo.

ĉinlingva: komparu: *Kuo.*

„Ĉinia historio." Ŝanĥajo 1921.

„*Ŝi-kieng.*" Fama malnova kolekto de poeziaĵoj.


**Meksikio** estas lando en simila situacio. Ĝi batalis antaŭ nelonge per leĝoj kontraŭ la influon de l'usonaj reĝoj super petrolo k samtempe kontraŭ la plej granda spirita potenco en la mondo, kontraŭ la katolika eklezio. Agrara revolucio antaŭiris, kiu forigis la influon de l'posedantoj de grandegaj bienoj.

„Tero k ‚Libero" estis la devizo de l'meksikaj revoluciistoj. Kaj: „La tero apartenas al tiuj, kiuj kulturas ĝin." Do, ankaŭ ĉi tie estas la tera problemo la plej grava motivo de l'batalo.

En Meksikio la plej granda parto de l'loĝantaro estas kamparanoj. Ilian situacion priskribas K-do J. Ker en „La Nova Epoko" (n-o 3, decembro 1930) jene: Li rakontas pri la valo de Teotihuakan: „. . . el la 8330 geloĝantoj 7914 posedas nenian grundon k 416 posedas malbonan teron malgrandkvante. Kune ili posedas nur 1/10 de la surfaco de la Valo. Kiu posedas la aliajn 9/10? Sep riĉuloj, kiuj ne loĝas en la Valo. Tiu fakto respondas al multaj demandoj. Ekonomiaj faktoj estas tre malmolaj k tre konvinkaj. Nature la pli ol sep mil senteruloj devis labori por la 7 riĉuloj. Ili laboradis 12 horojn ĉiutage por salajro de 50 ĝis 75 centavoj. (Centavo estas duono de usona cendo.)" Sed tiu salajro estas ankoraŭ alta, kompare al la plimulto de salajroj pagataj sur la kamparo en Meksikio. Plej ofte oni pagas nur 12 ĝis 30 centavojn tage. Estas preskaŭ la samaj salajroj, kiujn la mond-esplorinto *Humbold* citis jam en la jaro 1794. Krome, la kamp-laboristoj *(peones)* sur la grandegaj bienoj *(hacienda)* ofte devas aĉeti la varojn en vendejo de l'bieno. Tiel ili estas tute dependaj de la posedanto de l' bienego aŭ de ties administranto.

Ankoraŭ en la jaro 1921, post parceligo de multaj grandegaj bienoj, 12800 da ili okupis proksimume 60 elcentojn





**K-doj! Perantoj! Grupestroj!**

**Organizu la unuopan vendadon de „S-ulo"-N-oj al neabonantoj en via loko!**

de l'privata terpropraĵo, k la profesia statistiko de 1910 mencias nur 836 posedantojn de grandegaj bienoj. La plej granda posedanto de tero estas ankoraŭ nun la katolika eklezio, kvankam oni forprenis de ĝi jam antaŭ 70 jaroj multe da tero.

Per la kampara revolucio la posedantoj de grandegaj bienoj perdis sian influon. Iom post iom la revoluciaj gvidantoj *Kales* k *Rubio* realigas siajn celojn: disparceligi la grandegajn bienojn, instrui la kamparanojn kulture k profesie, plibonigi la viv-kondiĉojn de laboristoj. Grandegaj estas la malfacilaĵoj. *Rubio* rakontis pri indiĝenoj, kiuj plendis, „ke la pastro de l'vilaĝo minacis ilin je perdo de anima saviĝo, se ili akceptus la teron, kiun leĝo k registaro donas al ili; pro tio li ne prenus konfeson, nek baptus iliajn infanojn. Per tio multaj el ili lasis sin timigi k preferis plue labori kiel sklavoj sur la grandegaj bienoj k rezigni sufiĉan viveblon k bonan estonton por siaj infanoj, ol igi tiujn perdi ilian animan saviĝon." – Sed ne nur malklero k eklezia dependo de l'kamparanoj kaŭzas malfacilojn. Ankaŭ kun la katolika eklezio k kun la mastroj de l'petrolejoj devis kompromisi la meksikaj gvidantoj; ja, kontraŭ la lastaj, t.e. kontraŭ Usono, ili sukcesis nenion. Tamen ili jam sukcesis plibonigi la viv-kondiĉojn laboristajn sur la kamparo k en la industriejoj, akceli la disparceligon de grandegaj bienoj k la instruadon de l'kamparanoj.

L I T E R A T U R O :

e s p e r a n t a :

„La Nova Epoko" n-o 3 (87), decembro 1930.

g e r m a n l i n g v a :

*Adolf Rajñvajn:* „Meksikio leviĝas." Lajpcigo 1930.

„ISK" n-o 4, aprilo 1927.

a n g l a l i n g v a :

*Frank Tanenbaŭm:* „La meksika agrara revolucio." Vaŝingtono 1930.

h i s p a n l i n g v a :

„Duonmonata revuo, Organo de l'departemento de la nacia statistiko." 1925.

(Daŭrigota.)

*Vetig (16900), Gelnhaŭsen (Germ.).*

# La klasbatalo tra la mondo

### Lokaŭto de 300 modellignaĵistoj en Plzen (Ĉeĥoslovakio).

Ĉiu leganto de „S-ulo" legis en n-o 346 pri imitinda organizado de modellignaĵistoj en Ĉeĥoslovakio. Nun okazis denove konflikto en la laborejo, ĉar nomita komisiono ekkondutis kiel ceteraj kalkulantoj k spionoj, anstataŭ konstati kaŭzon, kial la fabrikataj modeloj estas karaj. Ni protestis k postulis forigon de la komisiono. La direkcio konsentis trakti, sed ne cedis al nia postulo dume forigi la komisionon el la laborejo, k prokrastadis trakti la aferon. Sekve ni ekagis jene: kiam iu el la komisiono aperis en la laborejo, eĉ kiam ili iris necesejon, ni ĉesis labori k fajfis per fajfiloj k bruis per ĉiuj eblaj rimedoj, ĝis ili malaperis en kancelarion. Tio konfuzis la direktorojn, sed ili ne cedis k prefere lasis fajfi 300 laboristojn, ofte kvinfoje dum 8 horoj, ol forigi trimembran komisionon. Post semajno ni ŝanĝis la taktikon k atendis matene ĉe l'enirejo k forpelis la ŝatatan komisionon el la laborejo. Alian tagon venis la komisionanoj, laŭ ordono de l'direkcio, sub aŭspicioj de sekretpolicano. Sed ili fiaskis ĉiuj. Ni ilin pelis, eĉ la policanon, tra la fabrika korto ĝis post la pordego de l'Ŝkoda-fabriko. Tiun tagon (24. 7.) ni strikis por devigi ilin trakti nian aferon. Je la fino de l'labortago ni ricevis monon k maldungan ateston.

K-doj k modellignaĵistoj (ĉefe en Aŭstrio k Germanio): ni akceptis la altruditan batalon de l'Ŝkoda-fabrikestraro (estras la miliardulo Ŝnajder Fr., kiu posedas 51 % de l'akcioj) kun decido batali ĝis plena finvenko, malebligi enkondukon de popecpaga sistemo. Ĉe Ŝkoda-fabriko, unu el la plej grandaj en Ĉeĥoslovakio, senlaboriĝis dum 2 lastaj jaroj 12 mil gelaboristoj. Malgraŭ tio la produktokvanto restis la sama k la neta profito estis eĉ pli granda lastan jaron. Gek-doj traduku nian unuan artikolon (n-o 346) por sindikataj gazetoj. Ĝis nun ni konvinkiĝis, ke modellignaĵistoj ne povas solidariĝi.

*J. P. (14382).*

### La ruĝa semajno en Seviljo.

Dum unu semajno proleta sango fluis torente tra la stratoj de Seviljo. La fusiloj de l'policanoj, krom la bedaŭrindaj viktimoj, detruis la demokratajn iluziojn k la naivan fidon, kiun la laboristaro havis al la respubliko de la 14-a de aprilo. La provizora registaro plenumis ne unu el siaj multaj antaŭaj promesoj. La feŭda kapitalista stato dume daŭras. En ĉiuj partoj necesas striki k striki por atingi plibonigojn. En la kamparo la terposedantoj ekspluatadas la malsatantajn kamparanojn. En la urboj al senlaboruloj petantaj panon oni donas kuglojn. La karceroj estas plenaj de K-doj. Andaluzio estas la regiono, kie restas plej multe da postsignoj pri la feŭdismo k ĝiaj devenoj; estas la grundo de l' *latifundismo*[1] k de l'vasalestroj; estas la loko de la salajroj 5- aŭ 7-pesetaj; de la deviga senlaboreco por dekoj da miloj, de la malsato de l'kamparanoj ... Seviljo, la ĉefurbo de Andaluzio, reprezentas la koncentrigon de la koleroj el tiu ĉi parto de Hispanio, k el ĉi tiu koncentrigo nepris eksplodi la revolucia fajrero. La ekzisto en Seviljo de revoluciaj sindikatoj k de la kom. partio donas organan formon al la situacio objektive revolucia. Post la Seviljaj laboristoj, la andaluziaj kamparanoj en multaj vilaĝoj sin ĵetas al la kampara revolucio. Estas impona vojiro: ĉiuj K-doj el ĉiuj tendencoj en unueca fronto marŝas al la realigo de siaj aspiroj k tremas la tero; k la suno subiras ses fojojn en la daŭro de l' batalo, dum la sango kuras en la stratoj de Seviljo ...

La ribela movado de Seviljo ne finiĝis, nur komenciĝis. La laborista unuecfronto estas la prologo por tutlanda unuecfronto de l'lab. klaso, kiu tra la kontraŭstaroj k malhelpoj efektiviĝos.

*R. Kiles (13661).*

[1] Movado por grandaj terposedaĵoj. – *Red.*

### La fino de l'granda tekslaborista striko en Norda Francio.

En n-o 348 aperis raporteto pri tiu strikego de 120 000 laboristoj (sub sama rubriko). Dek semajnojn daŭris la batalo, k ĝi finiĝis por unuj kun la propono Laval, tio signifas: socia asekuro pagata de l'laboristoj, sed kun kompenso de salajra plialtigo je 3 % ĝis la 15-a de septembro. Ekde tiu dato la pliigo de 3 % estas reduktata al 1 %. En la fabrikoj de l',,Consortium" (mastrara intereskomuno) pago de l' soci-asekuro fare de la laboristoj sen ajna kompenso. Bedaŭrinde tio ne estas venko de l'laboristaro; sed, kontraŭe, ĝi ankaŭ ne estas venko de l'mastraro. Malgraŭ la grava senlaboreco, kiun suferis la gelaboristoj depost monatoj, ili dum la batalo elmontris admirindan kuraĝon k persistemon k ofereman spiriton por defendi siajn rajtojn. Estas rimarkinde, ke multaj industriistoj, anoj de la nomita mastrara intereskomuno (Consortium), dum la batalo malligiĝis de ĝi k kontraktis apartajn akordojn, ĉu rekte kun siaj laboristoj, ĉu kun la laboristaj organizoj. La „Consortium" sekve perdis je sia potenco.

*C. T.*

# MI VOLAS SCII ...

Unu el miaj sovetiaj korespondantoj sendis al mi Bultenon de CK de SEU, en kiu mi kun ega miro povis legi, ke la SEU-gvidantoj postulis de siaj anoj ne uzi por korespondado tiujn adresojn el la SAT-jarlibro, kiuj estas signitaj per „S.P." Kion signifas tio? Ja nur, ke la SEU-gvidantoj instigas siajn anojn rigardi la socialdemokratajn SAT-anojn kiel danĝerajn klasmalamikojn. Mi nun volas scii, kiel pri la afero pensas la simplaj K-doj en Sovetio. Ĉu ili alproprigas al si la pensmanieron de siaj gvidantoj k rifuzas korespondi kun „S. P."-anoj, aŭ ĉu ili tiom pli multe korespondas kun tiuj „danĝeruloj" por konviki ilin, ke nur la KP-metodoj de la klasbatalo estas la ĝustaj?

ĉi teorio estas, ke la radianta energio, speciale la lumo, posedas difinitan mason; pro tiu eco ĝi estas submetita al la gravitado, tio signifas, ke lumradio povas esti altirata k devojigata de sia rektlinia vojiro per astro, kiu tuŝetas tiun fluglinion. Se la teorio estas prava, tiuj ĉi steloj devas aperi forlokigitaj je angulo, kiun la kalkulo de Ajnŝtajn fiksas je 1" 75. Estas tre malforta devojiĝo, kiun iuj malfaciloj eksperimentaj igas penige mezurebla; ankaŭ la rezultoj akiritaj depost 1919 ekde la eklipsoj sinsekvaj donis rezultojn nefirmajn, sed tamen favorajn, entute, al la relativisma hipotezo.

Nu, la kunulo de Siriuso liveras okazon por pravigo pli preciza; ĉar, se ĝia denso estas tia, kian ni trovis, la Ajnŝtajna efiko devas ĉi tie esti tridekoble pli markita ol por la Suno. Ja la devojiĝo de l'lumradio dependas ne de la grando absoluta de l'„gravita kampo", sed de ĝia rapida variado; forte koncentrita maso agos do, sur siaj randoj, pli forte, ol se ĝi okupus larĝan spacon. La eksperimento estas farita en 1925 k sukcesis: la mezuritaj devojiĝoj estas trovitaj egalaj, ĝis dudekono proksimume, al tiuj, kiujn oni antaŭvidis.

De nun niaj hipotezoj fariĝis probabloj tre fortaj; k la akiritaj rezultoj faras du ĵetojn per unu ŝtono, ĉar montrante al ni la materion en nesuspektitaj statoj, ili konfirmas la plej genian hipotezon, kiu eliris el homa cerbo depost Njŭtn (Newton).

**La telefono en la mondo.**

La nombro da telefonoj en la tuta mondo estas 32 712 254, el kiuj 59 po 100 estas en Usono, t.e. 16 k $^1/_3$ telefonoj po 100 usonanoj. Tio signifas 10-foje pli ol en la tuta cetera parto de l'mondo.

# TRA ESPERANTIO

**Ĉirkaŭ la Kongreso.**

LI — LI estas la aŭtoro de „ILI". Por ke lia portreto estu kiel eble plej granda, LI elektis por sia verko pli ampleksan formaton ol tiun, kutime uzatan de SAT. Malgraŭ la grandampleksa portreto la libro ne trovis bonan akcepton k la nombro de venditaj ekzempleroj estas ridinde mizera. Pro tio mi emis riproĉi al la Direkcio, ke ĝi eldonis tian vere tute senvaloran verkon. Kaj nur la ekscio, ke LI mem pagis por la eldono, forprenis de mi la decidon protesti ĉe la Kongreso kontraŭ la aperigo de „ILI".

LI estis elektita kiel sekretario de la Kontrol-Komitato; LI tiam volis diktatori k ordoni al la Direkcio de SAT, ke ĝi faru ĉi tion k tion, ke K-do Lanti devas nepre eksiĝi ktp.; LI sopiregis esti la redaktoro de „La Nova Epoko" k ne povis toleri la nekomplezemon de la Direkcio tiurilate...

LI venis al Amsterdamo . . . por transdoni al la Opozicio dokumentojn, apartenantajn al la Direkcio; post tiu malhonesta faro li deponigis malpuraĵon sur la seĝojn en la kongresejo k poste ŝtelire, honte malaperis; LI ja ne kuraĝis sidi minuton inter la kongresantoj; LI falis en abismon el malestimego, tiagrade, ke eĉ opoziciuloj, al kiuj LI fiservis, tute malkaŝe diris: „Ni ja malŝatas lin, sed utiligas liajn armilojn." Tiaj armiloj povas vundi nur ties farinton k uzantojn...

**Burĝa degenero.** — Inter la opoziciuloj estis du doktoroj, plej tipaj reprezentantoj de l'burĝa klaso. Tiuj burĝidoj havis la bonŝancon studi en universitatoj k tie ricevi diplomojn. Malgraŭ tio — aŭ pro tio — tiuj diplomitoj kondutis dum la kongreso pli maldece k krude ol la simplaj laboristoj, kiuj estas de ili erarigataj per sofismoj k demagogiaj paroloj. Unu el tiuj doktoroj elpensis kiel „argumenton", ke K-do Lanti havas „kontraŭrevolucian vizaĝon" k la alia montris sian kleron nomante lin: fripono, kanajlo, mensogulo, fiulo, faŝisto ktp. ks.

Tia konstato povas nur plifirmigi la klaskonscion de la proletoj; ili ja konvinkiĝos pli k pli, ke la burĝaro degeneras, vidante, kiel kondutas burĝidoj, kiuj enŝteliĝis en iliaj vicoj.

**Okuloj malfermiĝas.** — Kiam la Direkcio asertis, ke la reteno de la SAT-mono en Moskvo estas intenca k ke tio konsistigas parton el la makiavela plano celanta 1) ĉu meti la gvidadon de la Asocio en partiecajn manojn, 2) ĉu, en okazo de malsukceso, ĝin bankrotigi, pluraj sinceraj K-doj opiniis, ke tia aserto estas kalumnia, ke iel aŭ aliel la ŝuldo estos pagata. Forpasis pli ol unu jaro k la mono ne trafis en la SAT-kason. Kaj finfine la opoziciuloj demetis la maskon; ili ja laŭte deklaris ĉe la Kongreso, ke estus malsaĝaĵo pagi al la nuna Direkcio, ĉar ĝi fariĝis „socialfaŝista", „kontraŭrevolucia" ktp.ks. Tiel estas facile pravigi friponaĵon!..

Aŭdinte tiajn cinikajn dirojn, kelkaj K-doj ekkomprenis, ke la Direkcio ne kalumniis, sed male estis tre klarvida. — Domaĝe tamen, ke tiu klarvido ne montriĝis pli frue: la Adm. de SAT ja ne devus konsenti tiom grandan krediton al Drezen k K-io post senbaza k malsincera atakado ĉe la Lajpciga Kongreso.

**Essen — Amsterdam.** — Tagon antaŭ la Kongreso, unu el la plej grandbuŝaj kriemuloj aplombe k konvinke asertis: „Ni faros en Amsterdam, kion ni jam sukcesis fari en Essen." Estas fakto, ke bone organizita *malplimulto* sukcesis tie kapti en siajn partiecajn manojn la tutan gvidadon de la germanlingva LEA. Kaj tio estis la komenco de la skismo en la lab.esp.movado.

La tro memfida kriemulo k liaj helpantoj ne dubis pri la sukceso k jam dimanĉe dum la surstrata manifestacio k en la kongresejo mem ili kondutis kiel venkintoj en konkerita lando: afiŝoj, tukoj k.a. diversaj agitiloj sin trudis ĉie, surkovris la murojn k donis la impreson, ke la „Lanti-kliko" baldaŭ ricevos la „bonan lecionon", projektitan de la heroaj „ŝturmuloj".

Estas vere mirige, ke la SAT-estraro rilatis treege tolereme al tiuj pretendemaj fanfaronaĵoj. Sed la spektaklo ŝanĝiĝis lunde matene, antaŭ la malfermo de la unua laborkunsido. Finon al la petolaĵoj, sendube diris la „Lanti-kliko"; temas nun labori: je la 7$^1/_2$-a horo la kongresĉambro estis jam okupita de lojalaj SAT-anoj k kiam, je la 8-a, spione venis iu „doktoro" por esplori k poste raporti pri la stato en la batalkampo, li ne povis kaŝi sian elreviĝon ĉe la konstato, ke la bela plano de la „ŝturmuloj" estas malebligata de fruleviĝantoj. Tial okazis, ke la Essena venko iĝis tute Pirusa en Amsterdam...

**Optimismo.** — Mi legis, ke K-do Lanti estas kolerema homo. Kial do li povis aspekti tute indiferenta antaŭ la lavango da insultoj, per kiuj opoziciuloj superŝutis lin? Sendube tial ke li sidis sur la estrado apud K-do Krejt, la animtrankvila, bonhumora k sprita ano de la O.K.K.

La sukceso de l'Kongreso estas grandparte ŝuldata al tiu altkreska viro, kiu montris plurfoje vere heroan toleremon antaŭ la skandala konduto de tre strangaj „gastoj". Tial mi volas dolĉigi miajn acidajn notojn per aldono de forta dozo da optimismo, ĉerpita ĉe la plej alta prezidanto de l'XI-a SAT-Kongreso. *Alcesto.*

**Geinstruista kunsido.**

Kunvenis la 7-an de aŭgusto posttagmeze 15 gekolegoj en la Kongresejo. El Germanio 2, Anglio 2, Francio 3, Islando 1, Belgio 1, Nederlando 6. K-

Do mi estas scivolema. Laŭ mia opinio la anoj de la 2-a Internacio estas homoj kun propra penskapablo same kiel tiuj de la 3-a Internacio. Ambaŭ estas klasbatalaj organizoj, sed nur uzantaj diversajn rimedojn en la klasbatalo, jen demokration — jen diktaturon. Kial ekzemple en Aŭstrio la ideo de la 3-a Internacio ne volas progresi? Kial ankaŭ en Germanio k aliaj landoj malgraŭ egaj klopodoj de la kompartioj la S.P.-oj ne estas mortigeblaj? Ĉu nur pro tio, ke la komunistoj havas la ĝustan opinion k ĉiuj aliaj samklasanoj estas tro stultaj, kiuj tute ne komprenas tion aŭ kiuj tute ne emas esti liberigotaj el la katenoj de la kapitalismo? *4406.*

### Deklaroj al K-do 348 (Hbg.) pri lia artikolo en n-o 356.[1]

Kiel Viena tramisto mi opinias necese ĝustigi la ĝis nun aperintajn informojn pri la Viena tramo. Ĉe ĝi deĵoras proks. 16 mil homoj, inter ili estas 13 mil organizitaj en la libera (socialista), la ceteraj en la klerikala k nacia (faŝistema) sindikato. En Vieno troviĝas nuntempe pli ol 85 mil senlaboruloj. Tio rezultigis malaltiĝon de la nombro da veturgastoj je 50 milionoj jare. La logika sekvo — malaltiĝo de l'enspezoj k danĝera situacio de l' tram-entrepreno. Tiu stato devigis la direkcion raciigi la trafikon, malbonigi la kontrakton kun la tramistoj, mallongigi la kromhorojn ktp. La kostoj de l'deĵorantoj ampleksas 80% de l' tuta buĝeto. Estas facilkompreneble, ke oni penadis redukti tiun por la entrepreno plej gravan sumon. Pro la raciigo superfluiĝis preskaŭ 2000 tramistoj. La libera sindikato k direkcio interkonsentis pri tio, ke dum jaro ĉiu tramisto, krom siaj liberaj tagoj, ricevu 15 tagojn eksterordinarajn *nepagitajn* (dum ĉiu monato unu nepagitan tagon k dum junio k decembro, kiam ni ricevas dumonatajn salajrojn, du tagojn). Pri tiu kontrakto la direkcio aranĝis voĉdonon; nur se la plimulto konsentus, la kontrakto estus valida. Speciale K-do 348 rigardu la rezulton k la sintenon de tramistoj, kiujn li nomas revoluciaj k klasbatalaj. La klerikal-naciaj faŝistoj agitis *kontraŭ* tiu kontrakto, sed nur pro tio ĉar al iliaj sindikatoj nur apartenas tramistoj kun 15—25 deĵorjaroj aŭ pli, kiuj ne povas esti maldungataj laŭ ĉefkontrakto. La voĉdono rezultigis kompreneble grandan plimulton por mallongigi la labortempon k tiel *malebligi maldungon* al ni tramistoj.

Ĉu vi, K-do, povas nomi al mi iun tramdirekcion aŭ urbadministracion en Eŭropo, kiuj agis laŭ tiu principo? En Berlino ekz. la tramo antaŭe estis komun-posedaĵo k pro la sama mizero transiris al privataj kapitalistoj, sekve de kio en kelkaj tagoj 1000 tramistoj estis maldungitaj. Kaj hodiaŭ la aliaj laboras je malpli bonaj kondiĉoj ol pli frue, kvankam inter ili estas eble pli da revoluciaj k klasbatalaj tramistoj. La samo okazis en Dresdeno k aliaj urboj. Mi ne povas nun kompari niajn laborkondiĉojn kun alilokaj. Sed mi menciu, ke ni ricevas 14-monatajn salajrojn (ne nur la tramistoj, ĉiuj, kiuj deĵoras ĉe la komunumo), forpermeson de 7—28 tagoj ktp. — Kiel estas la afero en la urbo Vieno? Ĉiuj urbaj entreprenoj devas nur tiom perlabori, kiom necesigas la riparkostoj, la salajroj, impostoj ktp. Eĉ ne unu groŝo fluas kiel gajno en la urban kason. La prezoj de gaso, elektro, trambiletoj estas malaltaj kompare kun ĉiuj aliaj grandurboj. Pripensu, kontraŭ kiun ni devas esti revoluciemaj k klasbatalaj? Kontraŭ nian direkcion k la urb-administracion? Ĉu ambaŭ kulpas pri la mondkrizo, pro kiu 50 milionoj en unu jaro ne havas sufiĉe da mono por pagi veturbileton? Ne, K-do, la batalo por transformi la nunan kriman kapital. ordon ne povas okazi tiel, ke ni detruu la atingitajn avantaĝojn, sed kun scio k prudento paŝon post paŝo ni konkeru la de l'kapitalistoj ankoraŭ posedatajn fortikaĵojn.

Via rimarko, ke la kapitalistoj laŭvole povus forigi la socialistan administradon en Vieno, estas iomete politike naiva: ĉe la lastaj balotoj 702 mil homoj voĉdonis por socialistoj k 400 mil por burĝoj. Vi povas esti konvinkita, ke inter tiuj 702 mil, kiuj siajn voĉojn donis por la socialistoj, estas sufiĉe da klasbatalaj k revoluciaj homoj, por ŝirmi la konstitucion kontraŭ ĉiu minaco. *16928.*

[1] Ni intencis fini la diskuton pri tiu punkto per la skribaĵo aperinta en n-o 357/58 (vd. tie). Sed dume ni ricevis ĉi tiun respondon de kompetentulo (mem Viena tramisto), kies publikigo ŝajnas al ni tute necsa por klarigo de la temo k evito de miskomprenoj. — *Red.*

## Lingva ĥaoso ĉe la 4-a Kongreso de la Socialista Internacio.

Jam dum la malferma parolado de E. Vandervelde, kiu france parolis, montriĝis, ke lingva diverso estos granda malhelpo por la kongreso. Ĉiuj delegitoj, kiuj ne regis la francan lingvon, nur sente ekkonis la ardon k gravon de la vortoj de l'estro. Kontraŭe la K-don Seitz poste nur komprenis la germanlingvanoj. Nur per maŝinskribaj eldonoj de tiuj paroladoj en la tri kongreslingvoj (angla, franca k germana) ankaŭ la aliaj iom povis ĝui ilin.

Dum la sekvantaj kunsidoj la lingva problemo ankoraŭ pli akriĝis. Se ekzemple parolis germano, la angloj ankoraŭ devis finatendi la francan tradukon, ĝis venis ankaŭ por ili la tempo de l'kompreno. Por ŝpari tempon, la tradukoj de la paroladoj okazis nun en apudaj ĉambroj. Tial estis ĉiama elk enirado, kio kaŭzis ofte egan bruon k ĝenis la kompreneblon.

Ĝojiga estas la fakto, ke oni inter la delegitoj k oficistoj de la kongreso vidis tiujn, kiujn portis la verdan stelon. Tio donas la esperon, ke ankaŭ la Internacio iam povos fariĝi efektive internacia. *Grimme.*

# SCIENCO K TEKNIKO

**Esplor-rezultoj pri la planedo Siriuso.**

Siriuso okupas, en la mondo de l' stelaro, situacion tre netan, kiu havigis al ĝi la honoron esti elektata kiel horstelo, tio estas por difini la astronomian horon. Oni rimarkis baldaŭ, ke ĝi estis neinda je tiu ĉi honoro, ĉar ĝia moviĝo ne prezentis la dezirindan regulecon; k Besel eltrovis, en 1844, ke tiuj ĉi neregulaĵoj estis kaŭzataj de la najbareco de tiam nekonata astro, kiu dek-ok jarojn pli malfrue estis rimarkata de Klark (Clark). Ĉi tiu astro estas facile observebla per la grandaj modernaj teleskopoj; la studo pri ĝiaj perturboj, kiujn ĝi komunikas al Siriuso, permesas kun granda precizo difini ĝian mason, kiu estas iom pli malsupra al tiu de l'Suno. Oni sukcesis poste sciiĝi pri ĝiaj dimensioj dank' al metodo elprovita en multnombraj aplikoj, per kiu oni mezuras samtempe ĝian temperaturon k ĝian lumbrilon. La temperaturo (ĉe la supraĵo, oni komprenu!) proksimas al 8000 gradoj; ĝi do superas tiun de la Suno; se la kunulo de Siriuso havus la samajn dimensiojn kiel nia Suno, ĝi devus radiadi almenaŭ same multe; fakte ĝi radias (ĉe sama distanco) 360-foje malpli, per kio estas pruveble, ke ĝia surfaco estas reduktita, rilate al tiu de la Suno, almenaŭ laŭ sama proporcio. Ĝia radiado, alivorte, estas 19-foje malpli granda, kio el ĝi faras astron apenaŭ pli ampleksa ol la Tero.

De tiam, havante la ekzaktan mezuron de la maso, k la proksimuman valoron de l'volumeno, simpla dividkalkulo konigos la denson: *la kalkulo donas 53 000!* Unu kuba centimetro de tiu ĉi eksterordinara substanco havus mason de 53 kilogramoj, 2500-oble pli grandan ol tiu de l'sama volumeno de plateno. Certe niaj antaŭuloj ne estus akceptintaj bonfide tiel konfuzantan rezulton; ĝi fariĝas klarigebla por ni nur pro tio ke penetrinte pli antaŭen en la konon pri la materio, ni komprenis, per kia mekanismo ĝi povas esti alkondukata al simila stato de koncentriĝo.

Sed venis novaj pruvoj pri la realo de tiu ĉi fenomeno. La teorio de Ajnŝtajn (Einstein) liveris la okazon. Unu el la plej mirigaj konsekvencoj el tiu

do Aarse (Amsterdamo) estis elektata kiel estro de la Sekcio.

Denova starigo de la laboro estis pritraktata. En ĉiu lando ni havu *peranton*, kolegon, kiu sendos la materialon al la estro. Laŭ konsento de K-do Lanti aperos ĉiumonate paĝo instrua en „S-ulo“, en kiu estos aperigataj aferoj, kiuj interesas la tutan SAT-anaron. La tromulto k la aferoj interesaj nur por instruistoj estos sendataj al K-do van Vynckt, Bruselo, kiu prizorgos la maŝinskribadon k alsendon al la diversaj perantoj.

En la kunveno ankaŭ montriĝis, ke la diversaj kolegoj havis grandan intereson pri la instruado, metodoj, organizado ktp. en aliaj landoj. Oni interkonsentis prizorgi en la venonta kongresurbo viziton de la gekolegoj al la tieaj lernejoj k ankaŭ artikole sciigi ion pri sia propra lando.

Poste ĉiu ĉeestanta kolego raportis pri sia propra lando, precipe pri la stato de la esp. instruado, k oni vidis, ke la diversaj esp. instruistoj ankoraŭ spertas grandan kontraŭstaron de intelektuloj, kolegoj, inspektoroj, estraranoj ktp.

Regule aperos en „Tra Esperantio“ io pri la progresado de la esp- enkondukado.

Je la 19-a horo K-do Aarse fermis la kunvenon. Ĉiu kolego SAT-ana, kiu volas helpi en nia grava laboro, bonvolu anonci sin. La adreso de la estro estas: K-do *S. Aarse*, Veeteeltstraat 63, *Amsterdam.* Plena listo de perantoj ankaŭ aperos kiel eble plej baldaŭ. Kolegoj helpu! Anoncu vin kiel peranto! Sendu kiel eble plej multe al la estro! *Raportis S. A., A'damo.*

**Mia vizito al esperanto-muzeo en Vieno.**

El „neŭtralaj“ esp-aj gazetoj mi eksciis, ke en Vieno ekzistas esperanto-muzeo. Iun dimanĉon do mi decidis, partopreni ekskurson en tiun instituton. La eniro estis senpaga k tuj mi ekvidis kelkajn Gek-dojn, kiuj havis kiel mi la ALLE-insignon. (ALLE=Aŭstria Lab. Ligo Esp-ista). Funkciulo gvidis min tra la salono, kie en vitroŝrankoj kuŝis historiaj dokumentoj el la esp-a movado. Oni montris al ni bildojn k skribojn de d-o Zamenhof, librojn, gazetojn k inter la lastaj ankaŭ nian „S-ulo“n. La gvidanto eĉ menciis, ke esp-o havas grandan signifon por la laboristaro (kion politikaj partiestroj ofte ne komprenas). La vizito al la muzeo estis farinda.

Poste mi legis en „La Socialisto“, ke tiu muzeo estas „burĝa“ entrepreno k lab. esp-istoj rifuzas eniri ĝian estraron. Bone, sed estas pripensinde, ke la aŭstria registaro disponigis al la „neŭtralaj“ esp-istoj *senpage* la ejon por la muzeo en la nacia biblioteko. Ĉu la socialistaj esp-istoj povas diri pri sama subteno flanke de la socialdemokrata komunumestraro de Vieno? La fondo de esp. muzeo estus ja tasko por socialistoj, ne por burĝoj! Ĉu la neŭtraluloj estas pli internaciemaj ol ni? Kaj kial la urbestro de Vieno, K-do Sajc (Seitz), socialdemokrato, konsentis esti honora komitatano de la „burĝa“ muzeo, anstataŭ akceli la *laboristan* esp. movadon?

Jen mirigaj faktoj pri la esp. muzeo. *Vienano.*

**Per esperanto por malarmado.**

La subskribinto paroladis ĉe du kunvenoj pri la neceso de esperanto en la laboro por la paco. Ambaŭ, tiu de la Virina Fako de Ŭud Grin („Wood Green“)-Laborista Partio (20 personoj) k tiu de Ŭud Grin-Frataro (45 p.) akceptis jenan rezolucion: „Ni, membroj de la W.G.-Lab. Partio, reasertas nian konvinkon, ke armiloj estas ne protektilo, sed terura k pliiĝanta minaco al la popoloj de la mondo. Ni solene promesas fortege labori por la tuta forigo de armiloj k la decidado de internaciaj disputoj en internaciaj juĝejoj. Ni proklamas nian unuecon kun ĉiuj tra la mondo sen escepto de raso, koloro aŭ religio, kiuj estas laborantaj samcele. Al ili ni sendas per esperanto tiun ĉi leteron de saluto k kuraĝigo.“ En tiu ĉi krizo de l'mondhistorio, kiam la nacioj povas aŭ malarmi k prepari sin por pli altaj ŝtupoj de evoluo aŭ rekomenci frenezan konkuradon de armiloj k tute detrui civilizon, venas al ni eblé neniam revenonta okazo utiligi esperanton.

*P. L. Wright (15651), London.*

# TRA LA MOVADO

## ĈE LA NEŬTRALULOJ

### Naciisma disputo ĉe la 23-a Universala Esperanto-Kongreso.

La pasioj de l'naciismo eksplodis ĉe la universala esp. kongreso, kiu okazis komence de aŭgusto en Krakovo. „Por ne ‚ofendi‘ Polion, oni ofendas la ukrainojn“, skribas la „Folkscajtung“, organo de judaj socialistoj „Bund“, laŭ komuniko, kiun ni ricevis de K-do H. Bernstein (5383). La gazeto diras ke, ĉar oni ne volis ofendi Polion, oni ne donis la parolon, por saluti la kongreson, al la ukraina delegitaro, kiu post tiu okazo proteste forlasis la kongreson. La oficiala motivo de la rifuzo estis, ke salutas reprezentantoj de memstaraj regnoj k la ukrainoj ne posedas tian (tamen la germanoj en Ĉeĥoslovakio, kiuj estas en la sama situacio, rajtis saluti la kongreson). La interbatalo de l'patriotoj ĉe internacia esp.-kongreso karakterizas la nestabilan fundamenton de l'„rondo familia“.

# RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

**Petro Panĉ, La morto de Janulans.** Rakontoj. El ukraina lingvo trad. S. *Sinickij.* EKRELO, Leipzig. 1931. Prezo 0.30 mk. g. 35 pĝ. Form. 11×14 cm.

Tiuj ĉi tri rakontetoj (kun portreto de l'aŭtoro, biografio k antaŭparolo) devus aperi ĉe SAT, ĉar ili estis kontrolitaj de la Literatura Komisiono de SAT (en Odeso) k estis inter la verkoj, kiuj devus esti presataj en Moskvo por la SAT-konto. La traduko estas bona, la enhavo interesa.

**Krysta Ludw., Pri la prononcado de Esperanto.** Mondlingvo-eldonejo, *Katowice*, ulica Plebiscytowa 25. 1931. 30 pĝ. Form. 11×16 cm. Prezo nemontrita.

Utila broŝureto, klare verkita, kiu tamen ne elĉerpas la temon k evidente volas esti nur kvazaŭ alvoko al la „Lingva Komitato“ atenti pri la problemo de unuecigo de l'fonetiko en la esp-a prononcado. Certe ĉi tiu broŝuro ne estos la lasta verkita pri ĉi tiu temo. Kelkaj pres- k gramatikaj eraroj devus esti forigataj en dua eldono. **N. B.**

# MEMORNOTO

**Priesper. artik. k notojn enhavis:**

*Signalen*, Stokh., 6. 8.; *Der Deutsche Eisenb.*, Berl., 26. 7., 2. 8.; *Dilo*, Lvov, 6. 8. (en esp. k ukraina lingvo); *Der Volkslehrer*, Langensalza (instruista sindik. gaz.) 2. 8. enhavas artik. pri k en esp-o.
London, aŭg.

**Peresper. materialon enpresis:**

*Le Reveil Ouvrier*, Nancy, 5. 8.

# NIA POŜTO

*16 432.* — Via artikolo aperos.

*16 869.* — Por resendita manuskr. vi ŝuldas 0.30 mk. al la Adm. — *Red.*

# KORESPONDADO

Unu enpreso, simpla trilinia anonceto kostas 0,80 mk. g., ĉiu plia linio 0,50 mk. g. — Grandaj anoncoj kun kadro: po kv. cm. kostas 0,20 mk. g.

**Klubo Esperantista Bjuv, Svedio** havos letervesperon la 25an de septembro. L. k Pl. dezirataj. Resp. garantiata.

**La laborista grupo esperantista de Neuß,** „Verda stelo“, aranĝos la 5an de septembro varbvesperon kun ekspozicio. Tial ni petegas eksterl. K-dojn k grupojn sendi multnombre leterojn, ilustr. poŝtkartojn (poŝtmarkojn bildflanke), k aliajn esp-aĵojn. Skribu tuj! Ni nepre respondos.“ Adr.: R. Gerwin, *Neuss*, Germ. Kamillianerstrasse 22.

# ENHAVO

pâĝo
La rezultoj k la signifo de la XI-a Kongreso . . . . . 373—374
Letero el Litovujo . . . . . . . 374—375
Popola decido en Prusio . . . 375
Por nia medito . . . . . . . 375
La fonto de senlaboreco . . . 376—377
La klasbatalo tra la mondo . . 377
Mi volas scii . . . . . . . . . 377—378
Lingva ĥaoso ĉe la 4-a Kongreso de la Socialista Internacio 378
Scienco k tekniko . . . . . . 378—379
Tra Esperantio . . . . . . . 379—380
Recenzejo . . . . . . . . . 380
Korespondado . . . . . . . . 380

Presejo: Oscar Wettig, Gelnhausen (Germanio)

KUL